

MIA AVO

Mia avo, ĉiam kampulservisto estis
De groningena agrokulturejo
Riĉega estis la kampulestro de la avo mia
Sed mia avo malriĉa suferis pro reŭmatismo
Ĉar mia avo, tra la argilo rampis

Mia avo, ĉiam kampulservisto estis
Mia avo neniun tagon libertempis
Mia avo, kiu nenion de la mondo vidis
Nur la argilbulojn kaj fiherbojn vidis li
Ĉar mia avo, tra la argilo rampis

Mia avo, ĉiam kampulservisto estis
Interŝanĝe de terpomoj, iom da kaĉo kaj paneroj
Miaj avo kaj avino vivis mallukse
Por pli agrabla vivo al ili mono mankis
Ĉar mia avo, tra la argilo rampis

La kampulestra filo, nun sencele rondveturas
En aŭto tute nova
Kaj fumas cigarojn po sesdek cendoj
De la ĉagren' kaj feliĉo de mia avo
Kaj mia avo, pace kuŝas en la argilo

(Mien Opa, Trekwaark blz. 55)

SEMAMASOJ

Kapcline sub kverkoj
Silente kaj kompakte ili staras
Malvarma pluvo torentas
Suben gutas de la hararo grizkolora
Trankvile ili tie staras kaj pasive
La akvo en la fosaĵo murmuras
Nenio novaĵo plu parolindas
Kial ankoraŭ ilin priparoli
Kiam la morto tiel proksime estas?
Kaj ili lasas venton kaj pluvon
Furiozi sur la ter' malseka
Ĉio kion oni en la vivo akiris
Ja en la interno kolektiĝas?

(Zaodbulten, Trekwaark blz. 67)

VINTRO SUR LA PEIZER-KAMPAR'

La kampoj kuŝas kviete kaj blank' frostiĝinte
La ŝafoj malvarmegas antaŭe je la latbaril'
En Groningen staras la Martinituro
Muzikludilo, kiu supren sin etendas

La kanalo estas glacikovrita kaj ventŝirmita de
La brunaj kanoj laŭlonge de la dig'
Aŭdeblas mallaŭte la plendhurlado
De ruĝaksela turdo senespera

Subombro de nigraj korvoj
Kiuj flugas al sia tranoktejo fora
Kaj poneoj, malvarmaj, kiuj ambaŭ kune
Proksime je la rustiĝinta kradbarilo staras

La vintrosezono blovas tra miaj vestoj
Kiam mi tramalvarmiĝinte iras hejmen
Kiu volas vivi tiu lernu suferi
Kiam vintras sur la Peizer-kampar'

(Winter op de Paaizermoo, Trekwaark blz. 106)

AŬTUNO

Iom da koloro morte pendas ankoraŭ sur la ruĝaj rozoj
La somero tro rapide al sia fino venis
Pluvero helege pendas ankoraŭ sur la aŭtunaj kolĉikoj
Kiuj treme kaj frostiginte en la malgranda korto staras.

Tame ankoraŭ brilas la suno kaj sekigas la brunajn foliojn
De fago kaj kverko, kiuj algluiĝas al nia vojo
La somero ŝajne perdis la lastan esperon
Kaj forigis ĉion kion ĝi iam posedis.

Ĉu ankaŭ mi forigu ĉiujn miajn posedaĵojn
Ĉu mi ankoraŭ fojon vidos la florojn kaj la sonon
Ĉu mi ankoraŭ fojon aŭdos kanti la gajajn birdojn
Ĉu venontan majon min ankoraŭ fojon atendos komenco nova?

(Haarst, Trekwaark blz. 109)

Deze vier bovenstaande gedichten zijn uit het Drents naar het Esperanto vertaald door Luit Staghouwer van de vereniging Esperanto Noord-Nederland.

Dit gebeurde in het kader van de opening van het Peter van der Velde-jaar op 3 februari 2018.